# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Novembro 2003 MENSUEL/MONATA 74-a jaro, n-ro 11 (1181)

*Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem*

ISSN 1163.0442 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**


# EŬROPA SOCIA FORUMO
# SAT partoprenos




*Dum sia kunveno en la urbo Kaga (Isikawa) - de la 24-26.10.2003, japanaj SAT-anoj sendis mesaĝon al la Eŭropa Socia Forumo. Sur la foto estas:*
*Dua vico de maldekstre: OIKAWA Yukiko, TAHIRA Masako, KAWANISI Teturô, LAUFFENBURGER Alain, TANI Hiroyuki. Unua vico de maldekstre: Viola, MAKINO Tetu, BARKOVIĈ Kreŝimir, NISIKAWA Satoru, IE Harumi. Mankis k-do YAMASAKI Seikô pro malsano. Fotis k-do NONOMURA Yô.*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,*
*kiel vi povas konstati, tiun ĉi numeron de Sennaciulo vi ricevas kun granda prokrasto. Ja, mi pasigis iom pli ol tri semajnojn kun niaj japanaj gekamaradoj danke al ilia invito. Mi uzas la okazon por danki publike al ĉiuj kiuj tiel bonkore kaj afable okupiĝis pri mi dum mia restado en Japanio.*
*De la 24-a ĝis la 26-a de oktobro okazis en la urbo Kaga (Isikawa) kunveno de japanaj SAT-anoj al kiu mi partoprenis (vidu foton frontpaĝe). Dum tiu tre agrabla renkontiĝo en kamaradeca SAT-eca etoso, ni traktis diversajn temojn inter kiuj la kreon de la Japana LEA kaj eventualan kongreson de SAT en Japanio. Detala raporto pri tiu kunveno aperos en la decembra aŭ januara numeroj. Dum la kunveno ni sendis mesaĝon al la Eŭropa Socia Forumo, al la baldaŭa Monda Socia Forumo en Hindio kaj al la preparata Japana Socia Forumo.*
*Sed ni revenu al tiu ĉi numero de Sennaciulo. En ĝi aperas nova rubriko pri kiu respondecas nia kamarado Cezar. Temas pri SAT-kulturo. Ni invitas vin ĉiujn kunlabori kaj kontribui al tiu ĉi rubriko. Ankaŭ ni kreis apartajn TTT-paĝojn de SAT pri la SAT-kulturo (vidu:* ***http://www.marktplatz-deutschland.de/rsabg/pic2/sat-kulturo/****). Krome vi trovos kelkajn aliajn temojn kiuj certe interesos vin. Mi deziras danki al nia k-do Jakvo Schram kiu dum mia foresto kolektis kelkajn kontribuaĵojn kaj preparis ilin por helpi al mi post mia reveno. Ja, tiu helpo estis tre utila, ĉar en la oficejo atendis min amaso da poŝtaĵoj, 1920 retmesaĝoj, mendoj ktp. Evidente, iom post iom mi sukcesos ĉion fari, sed mi petas paciencon de ĉiuj el vi kiuj eventuale atendas mian respondon, aŭ iun alian agon. Dankon. Nun mi preparas min por la ESF kiu komenciĝos post kelkaj tagoj, esperante ke pluraj el vi ankaŭ partoprenos. Kamaradece al ĉiuj,*

*via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

S.A.T. OFICIALE ALIÿIS AL LA
EŬROPA SOCIALA FORUMO (E.S.F.)

SAT-ANOJ KAJ AMIKOJ AKTIVU KUN NI !




Nova PIV aperis !
Akiru ĝin ĉe SAT.
Prezo: 70 € + afranko
Por Francio : 4,27 €, Eŭropo 7,29 €
ekster Eŭropo : 9,49 €

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ,ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# Denove la religio

Marteno Bustin

Tiu-ĉi lando en kiu ni naskiĝis -Hispanio- ĉiam nostalgias pri la pasinteco kaj timas estontecon. Kiel malsekura adoleskanto, Hispanio alkroĉiĝas al la infaneco kaj timas la junecon. Ĝi amas ĉion konatan kaj forpuŝas novaĵojn. Lando kiu dormas ĝoje pensante pri siaj prapatroj kaj enprizonigante ian ajn deziron de libereco. Tiu-ĉi lando havas konstantan generacian konfronton kie la pli aĝaj subpremas, kontrolas kaj trudas siajn valorojn al la junularo kiu volas liberecon, ŝanĝojn kaj progreson.

Hispanio "la katolika", "la spirita rezervujo de Eŭropo", ĉiam alkroĉiĝanta al feroca tradicio, denove aperas kun siaj dramaj dogmoj por bremsi la evoluon de tiu-ĉi lando. Ankoraŭfoje la monarkio kaj la eklezio iras mane en mane kune kun la helpo de la riĉaj "familioj", kiuj neniam rezignis perdi sian povon. Denove tiu-ĉi tandemo vidas kun hororo ke "ilia Hispanio", ilia privata ĉasejo, marŝus tra padoj de libereco.

La hispana dekstro, ĉiam la sama, sentas konstante sian timon pri ĉio kio sonas maldekstre.

Bedaŭrinde la krio "Venas la ruĝuloj !!!", estas hodiaŭ tiel aktuala kiel antaŭ 60 jaroj. La totalisman spiriton oni vidas en ĉiuj politikaj agadoj kiuj baras la intelekton kaj konfuzas la plej multon kun siaj difinoj. Antaŭe ili tute rifuzis la kaŝeman demokratan laikan kaj malfermitan ŝtaton, nuntempe ili ĝin uzas por trudi sian kaŝeman faŝismon.

Progresema kaj demokrata socio havas kiel konstantajn malamikojn, influan ŝtatan eklezion, potencan armeon kaj fortan kapitalismon. Tiu triopo garantias faŝistan ŝtaton, reiron al la pasinteco kaj paralizon de la progreso.

La nuna registaro impregnata de la aŭtoritato kiun al ĝi investas la ne antaŭlonge pasinta historio, iom post iom rehavas la necesajn kolektivojn por trudi kaj daŭrigi totalisman dolĉigitan Ŝtaton estis la instrumentoj de la subpremo kaj submeto tra la konscia manipulado de la infanoj kaj junuloj, same kiel la trudado de tenaca patriarka aŭtoritato kaj la timo de la punado kiun suferis en ia ajn malobeo.

La eduka sistemo, en tiu-ĉi lando, antaŭ kaj post la diktaturo, escepte de la Respublika periodo, estis kaj estas en la manoj de la Eklezio helpata kaj subtenata



kaj por tio redonas la povon al tiuj kiuj ĝin havis dum tiom da jaroj, kun la escepto de la unuaj demokratiaj jaroj.

La nepoj de la frankistoj rekonkeras sian "heredaĵon" kaj kun pozoj, pli aŭ malpli, de "novaj demokratoj" firmigas siajn leĝodonojn kaj rehavas siajn privilegiojn.

Ni ne forgesos ke la tirana faŝisma frankismo bezonis la katolikan eklezion por ideologii la novajn generaciojn. Dum tiu bedaŭrinda tempo "kuraĝo kaj virto" estis sinonimoj de katolika doktrino. La valoroj de la katolikaj virtoj de la ŝtato, senkonsidere ĉu ĝi estas monarkio, faŝismo aŭ demokratio.

Dum la dua Respubliko, la religia temo disdividis la landon en du duonojn, ĉar la kapablo por ĝin modernigi ne ekzistis kaj ne estis eble malpliigi la religian povon kaj influon en ĉiuj sociaj tavoloj, ĉu pro aliancoj ĉu pro submeto.

La diktaturo sukcesis, per la eliminado de ia ajn disidento, malmultigi la antiklerikalan spiriton de tiu epoko, ĉar kun la malapero de la opozicio kaj reedukado de la loĝantaro malmulton povis fari la progreso